Premio Profesoro de Junularoj por elstaraj personecoj de la nacia kulturo.

La asocio Fratoj Saís (AHS) kiu arigas la junulajn kubajn artistojn kaj verkistojn transdonos al kubaj personecoj la premion *Profesoro de Junularoj*, la plej alta distingo de tiu organizaĵo.
Kiel parto de la dua kongreso de la junula organizo kiun partoprenas pli ol 300 delegitoj el la tuta lando, ankaŭ oni transdonos agnoskan atestilon al elstaraj junaj artistoj kaj verkistoj.
La evento sesianta en Havano, debatas temojn esencajn kiel la kulturpolitiko de la lando kaj la kuba socio kaj ankaŭ la junula rolo en tiu agado, krome oni laboras en artistaj komisionoj kaj ĝuis prelegojn de elstaraj intelektuloj kiel Graziella Pogolotti pri *Problemoj de la kuba kulturo*.
La sidejoj de la kongreso estas la studoj de la kinematografio ICAIC, la kulturcentro Bertolt Brecht, la centro Dulce Maria Loynaz kaj la kuba agentejo de roko.